

Heinrich Heine,

Ein Fichtenbaum steht  
einsam

Heinrich Heine,

En nord' unu pino

Heinrich Heine,

Pinarbo staras sola

Heinrich Heine,

En nord' unu pino en  
solo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

*tradukita de Friedrich Pillath*

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

*Iomete ŝanĝita versio*

Ein Fichtenbaum steht einsam  
Im Norden auf kahler Höh';  
Ihn schläfert; mit weißer Decke  
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵo;  
Glacia kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Pinarbo staras sola  
En nordo sur nuda altaĵ'.  
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio  
Ĝin kovras blanka litaj'.

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵ';  
Glacio kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Er träumt von einer Palme,  
Die fern im Morgenland  
Einsam und schweigend trauert  
Auf brennender Felsenwand.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,  
En unu dezert' orienta,  
Eterne pri lando alia  
Malgaje sopiras silenta.

Sonĝadas ĝi pri palmo  
Ĝemanta en orient',  
Soleca, sur arda deklivo  
En maldolĉega silent'.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia  
Ĝi estas en orient',  
Eterne pri lando alia  
Sopiras ĝi en silent'.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17).*

*Arg-1023-2072 (2014-05-23 14:24:32)*

*La poemo troviĝas interalie en <http://www.heinrich-heine.net/haupt.htm>.*

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lerm/librejo/0012/0008.php>.*

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliĝis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.*